

# ESPERANTO PROVENCE

Numéro 74 - Septembre 2008

4 numéros par an

## La prezidanta vorto

Somero finiĝas. Kiaj ferioj por mi : mi renkontis kaj ricevis multe da eksterlandanoj kaj francaj samideanoj de diversaj kulturoj kaj profesioj, kia riĉeco ! Kial por prezidanto ne utiligi tion pro montri al diversaj estraroj de nia regiono (PACA) ke ne nur la esperanta lingvo vivas, sed ankaŭ ĝi estas la plej bona rimedo por komuniki agrable kaj facile. Ni do, ĉiuj vivis dum la somero plurajn aventurojn : Kiu, kio estos la samideano, kiun mi renkontos ? Feliĉe ekde la unua kontakto la amikeco estiĝas....

Por atingi tion mi bezonas vin, por ke esperanto PACA estu reprezenta. Mi demandas do al ĉiuj grupoj : ARLES, AVIGNON, CAVAILLON, CARPENTRAS, MANOSQUE, GAP FREJUS, NICE, MARSEILLE, LA CIOTAT kaj la aliaj kies ekziston mi ne konas, igi la maksimumon de samideanoj aliĝi : La kotizo de 5€ jare reprezentas ĉefe la sendaĵon de nia gazeto kaj helpas min scii kiom da esperantistoj ni estas en PACA.

Same kiel mi ne konas la grupojn, estas same por la samideanoj kiuj kunmetas ilin. Mi estas libera por viziti vin kiam vi deziras tion, por klarigi tion, kion ni povos fari kune

Ĉis baldaŭ *Pierre OLIVA*, retadreso : [nlpo@free.fr](mailto:nlpo@free.fr)

**Claudy et Robert Demongeot-Allandrieu, Yvette**

**et Gérard Arnoux.** *nous invitent à se joindre à eux le 5 octobre.*

***Alors rejoignez-nous à MONTFAVET (à coté d'Avignon) le dimanche 5 octobre 2008 à partir de 10h00 au 3237 av. de la Croix Rouge Montfavet***

*Au programme: Esperanto et bonne humeur*

Apportez votre pique-nique.

Pour tout renseignement complémentaire, vous pouvez joindre :

**Yvette ARNOUX au 04.90.31.03.58**  
**Claudy DEMONGEOT au 06.68.84.49.80**

## Groupe Manosque

D 28 sept. 1 stand à Ste Tulle lors des fêtes des Parcs de la région PACA

-----  
Octobre : Permanences et cours  
les 1° et 3 ° vendredi de chaque mois de 17 à 20h à la Maison des associations

-----  
Samedi 15 novembre

1 stage d'une journée de 9h30 à 18h  
*repas tirés des sacs - participation 5 €*

## Groupe La Ciotat

Cours à La Ciotat : mercredi au CIQ-Fontsaite

17.30-18.30 : débutants (Metodo 11)

18.30-19.30 : perfectionnement : préparation à l'examen de FEI, 2ème niveau

19.30-21.00 : préparation à l'écrit du Kapableco

## STAGE INTENSIF D'ESPERANTO les 29 et 30 novembre à LA CIOTAT

Deux jours pour faire connaissance avec la langue internationale, sa structure et ses utilisations

de 9 à 17 heures, salle au dessus du Casino près du Lycée Lumière. Parking

L'adhésion comprend: le stage le matériel pédagogique le suivi pédagogique pendant un an

l'adhésion à Espéranto-France le bulletin régional Espéranto-Provence

45 euros (prix spécial pour les couples et les moins de 25 ans) à l'ordre de Espéranto-Provence

*renseignements et inscriptions :*

[esperanto.laciotat@wanadoo.fr](mailto:esperanto.laciotat@wanadoo.fr)

*ou Espéranto, 694 chemin de la Civade Verte 13600 La Ciotat.*

*ou 04 42 71 42 74 et 09 60 04 69 55*

# Liberaĵoj / Libres propos

page 2

de Michel ELIARD

*Summertime, somertemp', c'est l'été.....j'entends au loin les rires... et toi mon enfant tu délires et je sens la fièvre sur ton front..... N'est-ce pas aussi le temps pour l'esprit, la menso, de vaguer et libérer l'imagination?*

Le temps faustien des rêves de puissance et d'accumulation, les temps des idéologies totalitaires philosophico-religieuses ont fait leur temps. De finir d'avec les cléricatismes qui se servent des déités absconses ecclésiales et/ou rationalistes pour réduire l'humain à l'unidimensionalité de leurs ratiocinations. Il fut un temps où je répétais les mots de Michel Serres quand il affirmait que le bateau de la civilisation actuelle allait dans le mur et qu'il fallait résolument virer de bord. Je ne réalisais pas alors la vraie problématique qui, certe était de changer d'horizon, mais était plus sûrement de changer de bateau. Pour cela, fondons notre action politique sur des bases où les pauvres vœux humains de Paix, de Solidarité, de Droits de l'homme, de Démocratie ne seront plus des images saintes mais trouveront leur vraie matrice, leur vraie génitrice.

Cet appel n'est pas littérature car la semence existe et n'attend que des esprits désenclavés du mythe progressiste pour naître et éclore. Soyons les dignes héritiers de Louis Zamenhof non seulement par la fidélité mais aussi par l'imagination. Ce n'est pas en dénonçant les forfaitures des maîtres du monde et l'inanité des foules; en se dérochant avec des imaginaires inconsistants et pusillanimes que nous devons agir, mais en résiliant toute foi dans ce que ce monde donne à penser; en s'inquiétant peut-être de cette "Nouvelle anthropologie" que le Centre de recherche sur l'imaginaire et la création (CRIC) dirigé par Gilbert Durand a explorée.

Quelle extension serait pour l'Espéranto d'être le saint Christophe, le porteur d'une Civilisation! N'ayons pas peur d'être en politique l'in vraisemblable et vrai bouleversement rompant avec un monde en perdition. Les sciences physiques, avec la relativité et la mécanique quantique, ont mis l'homme dans un tout autre espace-temps que celui alors connu. Reste à nous d'assumer en politique le même saut civilisationnel où l'humain dans toutes ses dimensions sera respecté. <<micheliard@wanadoo.fr>>

de Jean-Louis GOBEAU -

Mi tre dankas vin pro via mesagho. Jes nia veturado ghis Bulgario ire kaj revene bone plenumighis. Dum tri semajnoj ni tendumis en montaro apud lago altlokita je 2300 metroj. Tiu fama loko nomighas: la sep lagoj de Rila. Chiumatene ni dancis specialan dancon nomitan: Paneùritmion. Kiam alproksimighas la plej grava momento, tio estas la festo je la 19a de aùgusto ghis la 21a dum tri tagoj, ni povas esti pli ol mil partoprenantoj.

La komponisto de tiuj dancoj estas Peter Danov (aù Beinsa Douno) (1864 - 1944) kiu estas spirita gvidanto aù instruisto bone konata en Bulgario. Dum ducentjaro li donis multajn instruojn por la alveno de la nova kulturo bazita sur tri Principoj: Amo kiu kunportas Vivon, Sagho kiu kunportas Lumon kaj Vero kiu kunportas Liberon. Li alportis spiritan renovighon por la homa animo. Ciuj temoj de la homa vivo - scienco, religio, arto, la individua, familia kaj socia vivo, spirito kaj materio, homa kaj transcenda subjektoj - estis lumigitaj per liaj saghaj klarigoj.

Rimarkinde estas ke li rekomendis lerni esperanton char laù li esperantistoj estas iniciatintoj aù pioniroj de la nova kulturo. Dum lia vivo esperanta revuo kaj libroj pri lia instruo estis publikigitaj. Nun chiuj estas elcherpitaj. Do mi komencis eldoni ilin denove.

Laù mia scio du aliaj spiritaĵoj rekomendis lerni esperanton : Oomoto en Japanio kaj Baha'hi en Persio. Se ni tralegas la historiojn de tiuj movadoj en Vikipedio, ni povas konstati ke ekzistis ligoj inter ili. Mi scias ke bulgaraj amikoj, muzikistoj, estis invititaj de Oomoto por ludi kantojn kaj dancojn kaj ankoraù preparoli pri Beinsa Duno.

De tri jaroj en tiu tendaro mi prelegas chiosomere pri la temoj: Esperanto, vivo de Zamenhof, la interna ideo. Chiuj gejunuloj nur lernas la anglan, la germanan, ktp. Mi provas kuraghigi ilin lerni ankoraù esperanton. Kelkajn plenkreskulojn decidis eklerni la lingvon kaj partopreni kursojn en Sofio.

Tiuj, kiuj interesighas pri la interna ideo de Esperanto povas skribi al mi. Kiam Zamenhof parolis pri ghi preskaù neniu povis kompreni pri kio li parolis. La konscio de la homoj ne estis ankoraù pretaj por ricevi tiajn ideojn. Nuntempe estas alia afero, parto de la junaj generacioj, dank'al konscio pli vasta, povas kompreni kaj esplori tiun internan ideon.

Mi volas aldoni ke, Michel Mounié, filozofia profesoro, baldaù eldonos libron titolitan : Le Christianisme Bogomile (La Bogomila Kristanismo). La Bogomiloj preparis la alvenon de Peter Danov en Bulgario. Tiu libro alportas novan vidpunkton pri la fama katara movado.

## La 41-a Konferenco de ILEI okazis en Porto Novo, Benino , 29 julio-5 aŭgusto 2008.

Mi citas la vortojn de Radojica Petrovic, prezidanto de ILEI :

" Esperantistaj instruistoj de ĉiuj kontinentoj renkontiĝas en Portonovo por kune akcepti la defiojn, lerni unu de aliaj kaj kuraĝigi sin reciproke sur la vojo de Zamenhofaj idealoj. "

Partoprenis 25 Afrikanoj el Burundio, Ebura Bordo, Ganao, Togolando kaj Benino , inter ili 2 virinoj. (unu el ili invitata danke al la profito de la aŭkcio de nia nacia kongreso en Martigues 2008). Partoprenis 18 eksterlandanoj el Japanio, Aŭstralio kaj Eŭropo , bona miksaĵo.

"Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero " estis la temo , ne pritraktita dum prelegoj sed spertita tra diversaj interŝanĝoj.



Renée Triolle prelegis pri UNESKO, Jean-Pierre Boulet starigis atelieron por verkado de libreto cele al edukado en Afriko, lige al Uneska laboro. Vlad'ka Chvatalova organizis Lingvan Festivalon, la Afrikanoj povis prezenti siajn multnombrajn lingvojn. Jasuo Hori prelegis pri Japanio, kunportis muzikilojn kaj ludigis la partoprenantojn per ili !

Latifou Gbadamassi prezentis instruadon en diversaj lernejoj, ni povis konstati la mankon de simplaj lerniloj ! Mireille Grosjean organizis ekzamensesion por la elementa kaj meza niveloj. Sebastien Essou gvidis la ekskursojn kaj konatigis nin kun la lando kaj la homoj en la taga vivo !

Post la Konferenco 7 eksterlandanoj – eŭropanoj- pluvizitis la landon, renkontis esperantistojn, vizitis orfejon, kie oni instruas esperanton, salutis refuĝintojn el Togolando, malkovris la projekton de Patro Jah , videbla ĉe-diasporafrica@yahoo.com -kaj vizitis famajn historiajn lokojn..Ni ne povas fini tiun artikoleon sen menciigi la imponan influon de la religioj.Ni perceptis la religian etoson de Benino (tra diversaj ceremonioj kun muziko, kantoj, dancoj...)en tiu lando multaj estas katolikoj, protestantoj, islamanoj –ĉefe tage kaj voduanoj-ĉefe nokte ! Por ĉiuj kaj ĉefe por Esperantistoj, Benino estas alloga, vizitinda lando .

de Pierre Oliva **KIOM DA ?**

Chu ni reprezentas grupon ? Jes Ja, legu la surprizon. En nia bela regiono kiun mi kredis iomete senhoma, divenu kiom da, ni estas ? Giganta respondo :205 samideanoj kiujn mi sukcesis detale nombri :. Departamentoj : 04 :12 - 05 :21 - 06 :38 - 13 :65 - 83 :34 - 84 :35. Kia surprizo, chu ne ?

Bedaŭrinde, malmulte scias pri unu la alian, Kaj ankoraŭ malmulte renkontiĝas aŭ partoprenas en komuna ago.

Tamen sendube pluraj estas proksimaj geografie.....Estas vere, ke en nia epoko ; la daŭra malsano estas pli kaj pli ignori sian najbaron. Despli, ekzemple, dum la kongreso en MARTIGUES tre malmultaj samideanoj el PACA partoprenis kaj ankoraŭ malmulte veni simple diri " saluton " .

Ni devas batali kontraŭ tio. Por sukcesi, ni devas partopreni la plej ofte , kiam renkontiĝo organiziĝas. Ne nur tio estas necesa, sed ankaŭ generale agrabla.

### Forum des associations La Ciotat

Esperanto-la Ciotat partoprenis la Forumon de Asocioj, la 6an de septembro . La ĝenerala temo estis "Rideto por la Naturo" kaj estis uzita la argumento de Sean O'Rian, kiu prelegis dum la Nacia Kongreso en Martigues : "Ruĝa rozo estas bela, bukedo estas belega, sed ĉu vi povas imagi mondon, kie kreskus nur ruĝaj rozoj ? samas por la lingvoj " .

Alia okazo estis reklami pri la komuna marŝado, la 18an de oktobro en Marseille por defendi la Nacian Parkon de la Fjordetoj ( Parc National des Calanques ). Ne forgesu, ke Esperanto-La Ciotat estas inter la fondintoj de asociaro La Ciotat Coeur de Parc .

Alia partopreno de Esperanto en la nuna mondo estis la ebleco "patroni" plantadon de arbo en Benino aŭ Brazilo laŭ iniciato de TAKE-Esperanto kadre de Kampanjo de Unuiĝintaj Nacioj .

### Zamenhof-festo en Unesko la 15-an de decembro 2008

Iniciate de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litova delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, la 15-an de decembro 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la naskiĝon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi estos bela enkonduko al la jaro 2009-a, la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Dum la festo estos pluraj oficialaj salutoj de la ambasadoroj kaj de reprezentantoj de Unesko kaj sekvos poste paroladoj, spektado de filmeto pri Esperanto kaj bufedo. La ĉefaj paroladoj estos tiuj de la franca lingvistino Henriette Walter kaj de la nepo de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof.

La tuto en solena etoso okazos de la 17,30 ĝis la 20,30 en la sidejo de Unesko en Parizo.

Ĉiuj esperantistoj estas varme invitataj partopreni. Por eniri la sidejon de Unesko vi devos esti en listo antaŭliverota al Unesko. Por esti en tiu listo, se vi pretas partopreni, bonvolu tuj sendi al la ret-adreso <zamenhof.che.unesco@co.uea.org> vian personan nomon, familian nomon, poshtan adreson kaj ret-adreson.

Venu, ni deziras montri al Unesko kiom da ŝatantoj de la lingvo de Zamenhof estas en vagonara malproksimeco de Parizo.

La organiza komitato

2009 : 150 jariĝo de naskiĝo de Zamenhof

estas la momento kontroli, kiel statas en via urbo la ŝildoj pri strato Zamenhof aŭ aliaj ZEOj .

Se ankoraŭ ne estas, skribu al via urbestro por ke nova strato, placeto, ĝardeno ( io ajn taŭgas) estu nomita Louis-Lazare Zamenhof , iniciateŭr de la langue internationale espéranto, 1859-1917

Necesas aldoni argumentaron ( Zamenhof pensisto, idealisto, lingvisto ) por pliaj informoj, rilatu kun Renée Triolle triolle.renee@wanadoo.fr aŭ Bello Baùco , chemin de la Civade Verte 13600 La Ciotat

### Turneo Alejandro Cossavella

La fama argentina muzikisto/kantisto Alejandro Cossavella (La porkoj kaj Strika tango) venos en Eŭropo dnk'al la invito de ARKONES en Pollando (19 -22sept).

Dum sia ĉeestfrancio Esperanto-Provence provos alveni lin , eble La Ciotat aŭ alie. Sekve afero.

Bonan iniciativon fari de Europe Democratie Espéranto ke la demandaro pri la sentivigo pri la lingvistikdemokratio en Eŭropo,

*Vidu la dokumento ĉe paĝo 15 de la revuo ESPERANTO info*

### Suspekto

Virino venis al la rabeno kaj diris: "Mi volas ekszedzinigxi!"

Rabeno: "Cxu vi trovis en li ion malbonan?"

Virino: "Jes, rabeno. Mi suspektas ke nia lasta filo ne estas lia..."

*{ se iu el vi ne komprenis la sxercon, li povas peti klarigon de sia fil(in)o aŭ nep(in)o... }*

## Ĉu vi konas la recepton por sukcesplena evento ?

page 6

-elektu ege belan kaj agrablan lokon : ĉiokaze Agay, ĉe la mediteranea marbordo.

- proponu bongustajn manĝaĵojn : en la panorama lastetaĝa restoracio de la hotelo "Le Renouveau", kie jam okazis dufoje la fama "MES" (Mediterranea Esperanto-Semajno). De tiu manĝloko, la vido estas mirinde fea !

-aldomu distran programon apud la hotela naĝejo, ĉestrande.

Ĉiuj tiuj ingrediencoj estis kunigitaj, dimanĉon 22an de junio, por la tradicia junifina aranĝo organizita de la klubo Fréjus/Saint-Raphaël.



34 samideanoj partoprenis, el kiuj du aŭstrali-anoj kaj unu belgino.

Post la tagmanĝo atendis nin :- tombolo, kantado kun Carmen, prelegeto pri Aŭstralio fare de niaj eksterlandaj geamikoj, - ludo per la vorto "amo" kun Christine (ni tiel povis kleriĝi, konatiĝante kun maloftaj vortoj kiel "ĵamo, kamo, ramo ..."), - cerbumado pri verboj kreitaj el familiaj nomoj, kiel Ĝ kabei, karolopiĉi, goldeni, lorjaki ..." kun Pascal, - prezened ankaŭ ripozado, libera babilado ...

Ni disiĝis, pensante jam pri la baldaj someraj Eo-aranĝoj (por kelkaj), kaj pri la bone meritita paŭzo antaŭ la septembra rekomenciĝo de la lerna periodo.

Dankojn al la organiza skipo, kiu efike sukcesis prepari tiun plaĉan eventon !

Pascal Vilain aŭ Georgia

---